**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 32

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Droni en **d** ␣ **t** ␣ **l** ␣ ␣.

**2.** Bona **gl** ␣ **r** ␣ pli valoras ol oro.

**3.** La registaro decidis anstataŭigi la pokalojn el pura arĝento per tiuj el arĝente galvanizita alojo el ␣ ␣ **pr** ␣, zinko kaj nikelo.

**4.** La muzikistoj solene trinketis la bonvenigan trinkon el la etaj glasoj de la ␣ **l** ␣ **t** ␣ ␣ de ridetantaj servistinoj.

**5.** La alternativo por la estonteco estas **s** ␣ **br** ␣: aŭ negativa evoluo de la mondo malebligos esperanton, aŭ pozitiva evoluo malnecesigos esperanton.

**6.** Oĉumelov vidas viron en la malbutonita ␣ ␣ **ŝt** ␣, kiu levinte supren la dekstran manon, montras al la amaso sian sangantan fingron.

**7.** La patro de la juna stelo de tenisludado Nathalie Dechy el Francio, entuziasmiĝis pri Esperanto kaj ␣ **n** ␣ **r** ␣ **pr** ␣ **n** ␣ ␣ informkampanjon, precipe en la sportista medio.

**8.** La lando, kiu estas inter la plej ␣ ␣**v**␣ **l** ␣ **z** ␣ **t** ␣ ␣ landoj en la mondo, ne meritis tian barbaran atencon, kiel okazis la 11an de septembro.

**9.** Iu ajn, kiu bone konas min, povas ␣ **t** ␣ **st** ␣, ke mia scio pri matematiko estas preskaŭ nula.

**10.** La kirko estas mirinde kaj inĝenie konstruita, ĝia belo estas nerakontebla, ĝiaj muroj estas ␣ ␣ **g** ␣ **t** ␣ ␣ per platoj el diversaj marmoroj.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Ili ambaŭ trinkis po du glasojn, sed verŝajne la komercisto estis ege laca, ĉar li nesenteble ekdormis en la fotelo kaj eĉ komencis iom **r** ␣ **n** ␣ ␣.

**2.** Hajjat bruligis fajron sub la samovaro, sur la pleton ŝi **ŝ** ␣ **t** ␣ ␣ plenmane avelojn, migdalojn kaj rosinojn por manĝeto kaj metis antaŭ la venintoj.

**3.** La Fina Venko fariĝis eksporta **v**␣ **r** ␣, kiun oni ne povas vendi, la Interna Ideo fariĝis la valoro en si mem, la trezoro, kiun oni ne vendas.

**4.** Specifa lirike-ironia **t** ␣ **n** ␣ signas tute apartan krean vojon de Puŝkin.

**5.** Tiu ĉi estas la plej granda pendigebla seruro (55,6 kg peza), farita el **ŝ** ␣ ␣ **l** ␣ kaj per vakso protektata kontraŭ rustiĝo.

**6.** Liberan tempon Nikolao Kopernik **d ␣ d ␣ ĉ ␣ ␣** al sciencaj esploroj, farante astronomian observadon helpe de iloj lokitaj sur la kastelturo.

**7.** Rusio longe **o␣ ␣ n ␣ ␣** ĉeeston de blukaskaj soldatoj de UN en Ukrainio, tamen antaŭ nelonge ĝi aprobis limigitan UN-mandaton.

**8.** La dehakitan abion la avo **tr ␣ n ␣ ␣** en la sinjoran domon, kaj tie oni komencis ornami ĝin.

**9.** La neoratora oratoreco de Giorgio Silfer **s ␣ rĉ ␣ ␣** la ĉeestantojn kaj la debato post lia prelego estis aparte riĉa.

**10.** La onklino vidinte sur Maslova modan **r ␣ b ␣ ␣**, mantelon kaj ĉapelon kun estimo akceptis ŝin kaj jam ne kuraĝis proponi al ŝi iĝi lavistino, opiniante ke ŝi nun staris sur la pli alta ŝtupo de vivo.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

pump', oficial', ĉerp', hered', naiv', teori', influ', munt', kritik', ofer'.

**1.** Pentuer observis la stelojn, rigardis la radon por la **␣ ␣ r ␣ ␣ d ␣** de akvo, iafoje promenis al la piramidoj.

**2.** Ni lasu artikolojn pri konspirteorioj al la interretaj forumoj kaj al tiuj, kiuj havas tro da tempo por **␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ m ␣**, maltro da pacienco por funde esplori.

**3.** La marborda regiono de Belgio estas poldero; ĝi bezonas sistemon de digoj, kanaloj, kluzoj kaj **␣ ␣ ␣ p ␣ l ␣ ␣** por resti seka.

**4.** Profesioj de ĉinaj laborantoj ĉefe estas konstruisto, kuiristo, tajloro, servistino kaj elektronika **␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ t ␣**.

**5.** Ni ĉiuj amas kaj ŝatas Vanesan kaj ni ĵaluzas vin, ĉar ni scias kiom ŝi povas esti **␣ f ␣ ␣ ␣ m ␣** kaj sindona.

**6.** Ekde 1968 la specialaj bierspecoj ĝuas restariĝon sub influo de la pli **␣ ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ m ␣** konsumanto, kiu sin turnas al la gustvarieco de la naturo.

**7.** La gvidantoj de tiu "libera spirado", ne donis la ĵuron de Hipokrato, kaj la danĝero estis granda ankaŭ ĉar nokte la homa subkonscio estas pli facile **␣ ␣ f ␣ ␣ ␣ b ␣ ␣**.

**8.** La kultura diverseco estas valora **␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ĵ ␣** de la homaro, kaj neŭtrala komuna lingvo faciligas interkompreniĝadon inter kulturoj, tenante proprajn identecojn.

**9.** La franca respublika kalendaro estis **␣ f ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣** kaj uzata de oktobro 1793 ĝis decembro 1805.

**10.** Por movadaj gvidantoj historia kono estas bufro kontraŭ la kaptiloj de **␣ ␣ ␣v␣ c ␣**, kiuj delogas refari multekostajn erarojn kaj ripeti samajn elreviĝojn.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** La ĉeesto de akvo aliloke en la universo ŝajnas aŭ ebla, aŭ ___.

**a.** eminenta **b.** avida **c.** probabla **d.** brava

**2.** Pli granda parto de energio, kiun averaĝa homo alprenas per nutraĵoj, uziĝas por teni la ___ kaj funkciigi la organismojn de la korpo.

**a.** temperaturon **b.** vakcinon **c.** vulpon **d.** piron

**3.** Starveturilo konsistas el eta platformo kun elektra motoro, du flankaj radoj, antaŭa vertikala ___ kun horizontala biciklosimila stirilo por ambaŭ manoj.

**a.** sekso **b.** stango **c.** silko **d.** tendo

**4.** Laŭ entomologoj, forfikulo estas absolute sendanĝera por homo, ĝi aktivas nur dum la nokto, estas timema kaj amas nur ___ kaj ombrajn lokojn.

**a.** festenajn **b.** komikajn **c.** ebriajn **d.** humidajn

**5.** Torio estas trovebla en la tergloba ___ en trioble pli granda kvanto ol uranio.

**a.** krusto **b.** veneno **c.** ŝtalo **d.** revuo

**6.** Ned dankis sian usonan amikon, kaj sendis ___ de la artikolo al s-ro Ĉiol, por komentoj.

**a.** stampon **b.** saŭcon **c.** kopion **d.** ripon

**7.** Oni havas ___ por kalkuli, surbaze de la lastaj tremoj, kio povos okazi en aliaj regionoj de la lando.

**a.** instrumentojn **b.** ŝelojn **c.** kopiojn **d.** teatrojn

**8.** La juĝisto lasis sekvatage la kaptitojn en bona prizorgo kaj iris al la princo, al kiu li ___ detale tiun strangan okazintaĵon.

**a.** distingis **b.** operaciis **c.** rezistis **d.** raportis

**9.** Amaskomunikiloj akre ___ pri kaŭzoj de la okazinta eksceso kaj plej ofte oni akuzis la bedaŭrindan instruiston de la angla lingvo pro nesufiĉa pedagogia prepariteco.

**a.** ribelis **b.** disputis **c.** turmentis **d.** ŝovis

**10.** La policestro komencis altrudi sin al la ĉambristino kaj, kiam li estis aparte agema, ŝi ekscitiĝis, nomis lin stultulo kaj maljuna ___ kaj tiel forte puŝis lin, ke li falis.

**a.** plumbo **b.** umbiliko **c.** diablo **d.** signalo